MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO

10

OKTOBRO 2025 Kol. 482/41

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo:** Poemo, Oktobro, Ceremonia inaŭguro en Pardubice, Greziljono, Tago en Choceň, Kio estas feliĉo, Esperanto-arbo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Oktobro

Vi dio de la vito sendas la sunradiojn al sukplenaj beroj,
al oraj beroj, al violaj beroj, estu gracoplena.

Sur la deklivoj varmaj sin etendas
al vi arbustoj pasiemaj per dancanta gusto,
parolas, vokas, kantas, petas, ke donu vi al ili
ardon por disdoni ĝin, en ilin ĝojon vi enspiru,
por ke ĝi ekfloru en okuloj,
malklaraj de ĉagreno.
Ni amas vinon ja por via gloro,
ĉar estas ni senfortaj homoj,
nur kun pokalo preĝas nia koro.



Karel Toman – Monatoj
En Esperanton tradukis J. Mráz

# Ceremonia inaŭguro de memorŝtono en Pardubice

Kiel jam menciite en la lasta Informilo, la 16-an de aŭgusto 2025, ĉe la Arbo de Amikeco en Bubeníkovy sady en Pardubice, estis ceremonie inaŭgurita la memorŝtono - okaze de la fondo de la E-klubo en Pardubice en la jaro 1909. Partoprenis kelkdekoj da esperantistoj el la tuta lando kaj la kanthoro Návrat.
La ceremonian parolon faris la klubprezidantino, sinjorino Miroslava Kosnarová, kiu parolis pri tio, ke la E-klubo en Pardubice estis fondita de MUDr. Stanislav Schulhof, kiu naskiĝis en 1864. Li estis escepte talenta homo, kiu laboris kiel dentisto, ĵurnalisto, dramisto, redaktoro, verkisto kaj poeto. Li



eniris la historion de la monda E-literaturo per la kolektoj "Per espero al despero", "Kion la vivo alportis" kaj "Aŭtunaj floroj". MUDr. Schulhof mortis en 1919 kaj lia domo, kie lia literatura heredaĵo estis gardata, estis detruita de bombo dum la 2a mondmilito, do signifa parto de lia verko bedaŭrinde ne estas konservita. MUDr. Schulhof estas entombigita en la juda tombejo en Pardubice, kaj la E-klubo ankoraŭ prizorgas lian tombon ĝis hodiaŭ. La strato, kie iam staris la domo de lia familio, estas nomita laŭ MUDr. Schulhof. Ekde la jaro 1995, la Klubo kunlaboras kun AEH.



Post parolo kantis la ĥoro kelkajn kantojn kaj ĉiuj fotiĝis apud la arbo. Poste ni iris al la Regiona Biblioteko en Pardubice, kiu ofte kunlaboras kun la E-klubo pri diversaj kulturaj eventoj. Nin bonvenigis la direktorino, sinjorino Radomíra Kodetová, kiu iom post iom montris al ni la tutan bibliotekon kaj rakontis al ni pri la historio de individuaj konstruaĵoj.

La biblioteko estis fondita jam en 1897 kiel la Publika Biblioteko de Pardubice. Post dek jaroj, la biblioteko translokiĝis al la domo numero 37 sur Zelené předměstí (Verda antaŭurbo). En la jaroj 1929-1960, la biblioteko estis sur la Placo de Smetana. Ĝia sidejo, kiu troviĝas sur la Pernštýnské-Placo ekde 1960, unue troviĝis en domo numero 77 (Oesterreich

domo) kaj laŭlonge de la tempo ĝi vastiĝis por inkluzivigi najbarajn konstruaĵojn (n-ro 78 U Pštrosa - Ĉe la Struto kaj n-ro 79 U Zlatého Beránka - Ĉe la Ora Ŝafido), kies konekto ebligis la pligrandigon de la gamo da servoj por legantoj kaj vizitantoj. Eblis plimultigi servojn. Ĉiuj tri konstruaĵoj staras apud la ikoneca Zelená brána (Verda Pordego) sur la okcidenta flanko de la placo. Dum pli ol 500 jaroj ĝi reflektas la riĉan pasinton de la loko - de loĝspacoj kaj komercaj establaĵoj ĝis la hodiaŭaj bibliotekaj servoj. Ĉiuj konstruaĵoj spertis multekostan rekonstruon kaj modernigon, kiu malkaŝis historiajn kelojn, apudajn murojn, pentritajn plafonajn ornamaĵojn kaj kelkajn ŝtonajn elementojn en la koridoroj.



Antaŭ la biblioteko estas metitaj sur la trotuaron tri tiel nomataj „Stolpersteine“ - ŝtonoj de la malaperintoj kiel memoro pri la viktimoj de la holokaŭsto - en ĉi tiu kazo pri la antaŭaj posedantoj de la domo - la familio Weiner: Rudolf, Růžena kaj Helena.

Ni ĉiuj ĝuis la gvidatan rondiron de la biblioteko kaj finis ĝin per kafo kaj kuko en la aparta legejo ĉe Příhrádek.

S. Nováková, L. Srbová

## Esperanto-kastelo Greziljono

La franca Esperanto-kastelo Greziljono invitas al siaj sekvaj E-eventoj en oktobro kaj aprilo 2026

2025-okt-24/nov-02 ➪14a AŬTUNAS, la Esperanto-ferioj, kursoj kaj FEI-ekzameno
kun *Renée Triolle C1-C2, Dalia Pileckiene B1-B2, Alain Delmotte A1-A2*

2025-okt-21/28 ➪Ĥora (korusa) renkonto kun *Bernard Bigonnet*

2025-okt-21/nov-06 ➪Volontula komuna laboro, precipe ekstere en la parko kun *Isabelle Nicolas*

2026-apr-17/27 ➪14a PRINTEMPAS, intensivaj kursoj kaj KER-ekzamenoj
kun *Zsófia Kóródy, Birke Dockhorn, Marion Quenut, Paweł Fischer-Kotowski*

Vi povas aliĝi tuj!
Esperanto-Kulturdomo, kastelo Grésillon
49150 Baugé en Anjou – France
Telefono: +33-2 41 89 10 34 (respondilo)
Retadreso: kastelo@gresillon.org Retejo: gresillon.org

## Tago en Choceň kun fervojo ne nur miniatura

La 6-an de septembro 2025 la ĉeĥa urbo Choceň vekiĝis al la etoso de trajnoj. Antaŭ la 10-a horo ĉirkaŭ dek du entuziasmuloj

kunvenis en la fervoja stacidomo, pretaj por aventuro, kiu promesis miksaĵon de fervojo kaj amikeco.

La programo komenciĝis per trankvila promeno tra parko al la historia kastelo. Tuj antaŭ la kastelaj pordegoj, ni trovis ĉarman miniaturan fervojon, kie ni povis sperti (sed ne spertis) ĝojon de veturado en malgrandaj vagonoj. Sur la korto la etoso ŝanĝiĝis, ĉar ni enprofundiĝis en la mondon de telegvidataj modeloj de ŝoseaj veturiloj kaj konstrumaŝinoj.

Du kastelaj ĉambroj prezentis la ĉefparton de la taga temo: bele aranĝitaj, funkciaj fervojaj modelaj vagonaroj. La precizeco de la detaloj estis impresa, transportante nin al miniatura mondo, kie ĉio funkcias perfekte.

Post la modela ekspozicio, ni promenis al la loka parto Peliny. Tie simpatia loka samideanino aliĝis al ni kaj fariĝis nia gvidantino, riĉigante nian sperton per siaj lokaj scioj. Laŭ mi, la plej mojosa kulmino de la tago estis la observado de trajnoj super la fervoja tranĉeo de Choceň. Rigardi la realajn trajnojn veturantajn sur la fervoja koridoro donis al ni momenton de admiro kaj miriga kontrasto al la modeloj, kiujn ni antaŭe vidis.




Irante denove tra la parko, ni subite vidis ŝildojn kun surskriboj en Esperanto. Kia surprizo! Ŝajnas, ke Esperanto jam vere estas lingvo internacia. Poste la grupo alvenis al la restoracio "U osla" (Ĉe la azeno), kie

nia loka gvidantino jam adiaŭis kaj akceptis niajn dankojn. Post bongusta tagmanĝo, plenaj de energio, ni daŭrigis al la plua programero: la Muzeo de TT-modeloj, kiu troviĝas rekte en la stacidomo. La tago finiĝis per agrabla kaj vigla diskuto "UK Brno per miaj okuloj" en nia klubejo, ankaŭ situanta en la stacidomo. La tago en Choceň estis perfekta kombino de nia pasio por modelismo kaj la komunuma spirito de Esperanto.

Petr Diblík

## Kio estas feliĉo

Ĉu vi scias, kio estas feliĉo? Ĉu ĝi estas domo, aŭto kaj dometo? Ne, feliĉo estas infanaĝo, kiam panjo kaj paĉjo estas tie. Ĉu vi scias, kio estas feliĉo? Kiam vi havas monon kiel rubon? Ne, feliĉo estas familio, ĝi estas la ridetantaj vizaĝoj de infanoj. Ĉu vi scias, kio estas feliĉo? Kiam iu promesas al vi bluan ĉielon? Ne, feliĉo estas kiam vi havas multajn homojn ĉirkaŭ vi. Feliĉo estas kiam vi signifas ion por iu. Kiam vi feliĉigas iun. Kiam vi povas fidi je iu. Kiam vi volonte helpas ĉiujn. Kiam iu ŝatas memori vin. Kiam vi ne volas ĉion nur por vi mem. Kiam vi aprezas tion, kion vi havas. Kiam vi ne serĉas ion pli bonan. Kiam vi eĉ ne scias, kio estas envio. Kiam vi ne havas malamon en via koro. Kiam vi povas ridi eĉ tra larmoj. Kiam iu vere amas vin. Kiam vi povas pardoni kaj ankaŭ revi. Feliĉo estas tio, kion ĉiu homo ŝatus havi.



Tamen, ne ĉiuj havas la saman ideon pri feliĉo. Iuj homoj kontentiĝas pri malmulto, iuj volas riĉecon kaj famon. Iuj homoj deziras tion, kion la alia homo havas.

Tial multaj homoj neniam konas feliĉon.

El la interreto tradukis L.S

## Esperanto-arbo



En la botanika ĝardeno de Mendel-universitato kreskas arbeto likvidambaro storaka (Liquidambar styraciflua). Lunde la 28-an de julio 2025 estis tie senvualigita tabulo kun surskribo Arbo de internacia interkompreno – Strom mezinárodního dorozumění okaze de la 110-a UK 2025 en Brno. La arbon donacis Mendel universitato. Pri la arbo rakontis direktoro de la ĝardeno inĝ. Michal Pavlík, kies patrino estis esperantistino. Ĉi tiu arbo havas grandajn verdajn foliojn en la formo de kvinpinta stelo.

El la kongresa kuriero Drako el Brno

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše příjmení jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.